Francilia esperanta federacio

# Ĝenerala Asembleo 2024

## ĜENERALAĴOJ

La jarkunsido 2024 de la francilia federacio de Espéranto-France (UFE) okazas sabaton la 16-an de marto je la 10a matene. Ĝi okazas mikse: kaj rete, kaj surloke en la sidejo. Entute 17 membroj partoprenas: 5 rete, 12 en la sidejo. La prezidanto, Marc Giraud, malfermas la kunsidon je 10:10.

## REZULTOJ DE LA VOĈDONADO

La membroj povis voĉdoni rete per la retejo balotilo.org, krom 5 membroj sen retpoŝtadreso, kiuj povis voĉdoni poŝte. La voĉdonado finiĝis la 15-an de marto matene je 00h00. La celo de la baloto estis (mal)aprobi la agadraporton 2023-2024 kaj la financan raporton 2023, kaj elekti novan komitaton. La du raportoj legeblas en nia retejo ĉe https://esperanto.paris/membro-kunvenoj

Ricevintoj de balotilo: 98 rete kaj 5 poŝte, entute 103

Voĉdonintoj: 50 rete kaj 1 poŝte, entute 51

Elcento de partopreno: 49,5 %

- Aprobo de la agadraporto: 45 aprobas, 0 ne aprobas, 6 sindetenas. Konklude la agadraporto estas aprobita.
- Aprobo de la financa raporto: 45 aprobas, 0 ne aprobas, 6 sindetenas. Konklude la financa raporto estas aprobita.

Elekto de nova komitato:

La komitato enhavu inter 9 kaj 15 membrojn. Cetere, la kandidato devas esti aprobita de almenaŭ la duono de la voĉdonintoj, tio estas ricevi almenaŭ 26 voĉojn.

- Raymonde Coquisart: 42 voĉoj
- Pierre Gauthier: 47 voĉoj
- Didier Janot: 44 voĉoj
- Aleks Kadar: 40 voĉoj
- Aurélien Lestage: 44 voĉoj
- François Lo Jacomo: 45 voĉoj
- Didier Loison: 47 voĉoj
- Laure Patas d'Illiers: 45 voĉoj
- Sabrina Rusch: 43 voĉoj
- Guillaume Vera-Navas: 42 voĉoj

Konklude, ĉiuj kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al la nova komitato.

La nova komitato elektos en si mem novan estraron dum sia venonta komitatkunsido, la 22an de marto.

Ĉiuj membroj povas sendi mesaĝojn al la komitato per la retpoŝtadreso komitato-francilio@googlegroups.com

## PASINTA JARO

Temo prezentata de Marc Giraud, la nuna prezidanto.

La eventoj de la pasinta jaro estas priskribitaj en la agadraporto (https://esperanto.paris/IMG/pdf/agadraporto2023.pdf). Ilin prezentas la prezidanto kaj la prizorgantaj komitatanoj. La komitato petas de la partoprenantoj iliajn rimarkojn pri la organizitaj eventoj.

Pasintaj eventoj ne menciitaj en la agada raporto kaj prezentitaj dum la ĜA:

- revigligo de la francilia junularo: tio agado ne estas organizita de la komitato, sed la partoprenantoj estas membroj de nia federacio kaj Aurélien Lestage partoprenas. La junaj membroj organizis renkonton en Denfert Café, plurajn junularajn babilrondojn en nia sidejo, kreis konton ĉe Instagram
- prezento de Esperanto en Nanterre, ĵus okazinta (merkredon 28/02/2024): prezentis Pierre Gauthier kaj Guillaume Vera Navas, 7 homoj ĉeestis, eble klubo kreiĝos en Nanterre.

## FINANCOJ

Temo prezentata de Didier Loison, la nuna kasisto.

Kiam lastjare Espéranto-France plialtigis siajn kotizojn, ĝi ne altigis la sumon dispartigitan al la regionaj federacioj. La komitato de nia federacio insiste petis plu ricevi 10% de la nova landa kotizo, kaj sukcesis atingi konsenton de Espéranto-France. Nun nia federacio denove ricevas 10% de la landa kotizo.

La financa raporto 2022 enhavis eraron. La kasisto korektis ĝin. La korektita versio legeblas en https://esperanto.paris/membro-kunvenoj

La financa raporto por la jaro 2023 montras profiton je pli ol mil eŭroj (precize 1.049,43€).

Entute nia federacio posedas pli ol dudek sep mil eŭroj (precize 27.376,40€).

Konklude, nia federacio kapablas financi projektojn. Kio bremsas lanĉo de projektoj ne estas manko de mono, sed manko de disponeblaj homfortoj.

## ARĤIVOJ

Temo prezentata de Pierre Gauthier, la nuna reprezentanto ĉe Espéranto France

La arĥivoj de nia federacio nun kuŝas senorde en la kelo aŭ en ŝranko en la kunsidoĉambro. Povas esti ebleco ke niaj arĥivoj estu inkluzivitaj en granda profesia projekto pri esperantaj arĥivoj en Francio, prizorgata de Pascal Dubourg Glatigny kun Archives nationales de France (https://www.archives-nationales.culture.gouv.fr/).

Atentu ke la projekto temas ne nur pri la arĥivoj de asocioj, sed ankaŭ pri la privataj. La esperantaj dokumentoj de iu esperantisto riskas esti taksataj kiel senvalora fatraso kaj esti forĵetitaj rubujen, ekzemple dum transloĝiĝo aŭ post morto de la posedanto. Tamen ĉiuj esperantistaj dokumentoj povas esti valoraj. La

projekto celas ekzameni, malselekti duoblaĵojn kaj taŭge konservi.

## NUNA JARO

Temoj prezentata de diversaj komitatanoj. La membroj povas starigi demandojn, sugesti agadojn, proponi helpon.

- Matematika salono (https://esperanto.paris/salono-de-matematikaj-ludoj-kaj-de-kulturo-matematika): ĝi kontentige okazis lastjare, por la venonta la federacio petas homfortojn- prefere gejunuloj - por deĵori en la budo kaj akcepti grupojn de lernejanoj.
- Zamfesto 2024 (https://esperanto.paris/esperanto-festo): la respondeca komitatano, Raymonde Coquisart, ne ĉeestas la ĜA-n. La fervojistoj sendis leteron, al kiu nia federacio devos respondi. Nun ne klaras kion nia federacio faros venontan decembron pri Zamfesto. La afero estos traktata dum venontaj kunsidoj de la komitato kun la 2 aliaj asocioj (la fervojistoj kaj la pariza grupo de SAT-Amikaro)
- Esperanto 94: la klubo nomita "Espéranto 94" kolapsis. En la departemento 94 (Val de Marne) loĝas proksimume 15 membroj, sed ŝajnas ke neniu el ili deziras revivigi la klubon. Tial ĝi estas fermota. La komitato laboras por oficiale kaj kontentige fintrakti ĝiajn financojn kaj arĥivojn.
- Junularaj agadoj: la junaj membroj organizos prezenton de TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La prezento okazos rete, sed pluraj membroj partoprenos kune en la sidejo. La dato estas fiksota. Se la evento estas malfermata al ĉiuj sendepende de aĝo, nia federacio konsentos financi aĉeton de keksoj por venigi surlokajn ĉeestantojn.
- Ludoj por infanoj: Elisabeth Barbay montras valizon, kiun ŝi kreis. Ĝi enhavas materialon por instrui Esperanton al infanoj pere de diversaj ludoj. Elisabeth ofertas sian valizon al homoj, kiuj rilatas al infanoj kaj ŝatus instrui Esperanton. Ŝi deziras organizi prezenton de sia valizo en nia sidejo. La federacio konsentas pri la propono. La dato estas fiksota.

## KONKLUDO

La tagordo estas fintraktita. La prezidanto dankas ĉiujn partoprenantojn. La ĝenerala asembleo finiĝas je 11:15.